

# INTER NI



Numero 224

estas ĉiunonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Decembro, 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5



Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**SUKCESAN ZAMENHOFAN TAGON kaj FELIĈAJN FESTOTAGOJN deziras al vi la redakcio de INTER NI. Ne forgesu reaboni por la nova jaro de nia gazeteto.**

ATENTIGO al niaj eksterlandaj abonantoj: Eble vi jam miris pro la eta abona prezo por INTER NI. Sed nun, pro poŝtokostoj, ni devas bedaŭrinde altigi la abonprezon por sendi nian gazeteton eksterlandan. Ni esperas, ke vi komprenos kaj daŭre restos inter ni.

## MONTEVIDEO 10.XII.1954 - MEMORINDA DATREVENO

Kiel konate UEA estas en konsultaj rilatoj kun Unesko ekde 1954. Vendredon la 10-an de decembro en la menciita jaro Unesko oficiale rekonis la valoron de Esperanto por la edukado, la scienco kaj la kulturo. Estis historia tiu momento ne nur por nia Movado, sed ankaŭ por la kulturo de la mondo. Sabaton matene ĉiuj gazetoj alportis la novaĵon. La gazeto „La Tribuna Popolar” de la dekunua de decembro notis ĝin sub la titolo „Triumfo del Esperanto”. Estis fakte vera triumfo. Profesoro Carlo Minnaja detale raportas pri la okazintaĵoj en la verko „Eseoj memore al Ivo Lapenna” (2001). Okaze de la jubilea jaro indas relegi pri tiu memorinda Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco, dum kiu en Montevideo vere sukcese defendis Esperanton prof. d-ro Ivo Lapenna. Ni ja konas liajn oratorajn talentojn kaj atingiĝojn. Feliĉe ankaŭ hodiaŭ ni havas la eblon ĝui pri la parolarto

de Ivo Lapenna, ĉar estas eldonitaj du kompaktdiskoj (2003) enhavantaj elokventajn paroladojn de la prestiĝa korifeo. Krome estas grave ne forgesi la verkon „Elektitaj paroladoj kaj prelegoj” (1966), en kiu ni per okuloj povas sekvi la faman oratoron sur internaciaj podioj. Ĉiu parolado lia estas verko de fekunda menso, prezentita kun la krea spontano de vera oratoro. Lia simpatia voĉo kaptas nin. Ĝi gvidas aŭskultantojn tra la valora kaj vive prezentita enhavo. Prof. J.C. Wells skribas: „En unu afero Ivo Lapenna restas por mi ideala figuro, inspira modelo: nome kiel parolanto de Esperanto. Ĉu temas pri oratorado, ĉu temas pri ĉiutaga konversacio, mi admiris kaj admiras lian lingvokapablon. Lia propra lingvofono - la kroata kun konsiderinda influo de la itala - dotis lin per prononco tre proksima al la internacia Esperanta idealo. Lia konscio de sia publiko pelis lin al klara esprimado, al eleganta sed simpla elekto de vortprovizo, kaj al perfekte formulita sintakso. Li mem flegis sian lingvouzon, kaj per sia ekzemplo montris al aliaj kiel fari same. Lia daŭra testamentaĵo troviĝas ne nur en la organizado de la movado, sed ankaŭ en *la fundamento*, sur kiu kuŝas la tuta konstruaĵo de Esperanto, nome en la lingvo mem.” Dankeme ni konservu la memoron pri tiu ĉi signifa atingiĝo antaŭ kvindek jaroj en Montevideo.

— Jorma Ahomäki  
Turku, Finnlando

#### A.A.A.M.M.

Antaŭnelonge oni diagnozis al mi A.A.A.M.M. - Aĝo-Aktivigita Atento-Manka Malsano. Jen la simptomoj:



Mi decidis lavi mian aŭton. Ekirante al la aŭtejo mi rimarkas, ke poŝtaĵoj troviĝas sur la koridora tableto.

Mi decidis kontroli la poŝtaĵon antaŭ ol lavi la aŭton.

Mi metas la aŭtan ŝlosilon sur la tablon, metas la rubpoŝtaĵon en la rubujeton sub la tablo, kaj rimarkas, ke la rubujeto plenplenas.




Tial mi decidis meti la fakturojn denove sur la tablon kaj unue forigi la rubaĵon.

Sed tiam mi pensas al mi ke, pro la fakto ke mi estos tuj apud la poŝtkesto kiam mi forigos la rubaĵon, kial mi unue ne pagu la fakturojn?

Mi prenas mian ĉeklibreton de la tablo kaj vidas, ke restas nur unu ĉeko.

Miaj kromaj ĉekoj troviĝas en la skribotablo en la kabineto; tial mi iras al la kabineto, kie mi trovas ladskatolon da kolaĵo, kiun mi estis trinkanta.



Mi serĉos miajn ĉekojn, sed unue mi devas movi la ladskatolon da kolaĵo

flanken, por ke mi ne akcidente renversu ĝin.



Mi konscias, ke la kolaĵo varmiĝas kaj mi decidas, ke mi devas meti ĝin en la fridujon por konservi ĝin malvarma.

Dum mi iras al la kuirejo kun la kolaĵo, vazo da floroj kaptas mian atenton - ili bezonas akvon.



Mi metas la kolaĵon sur la bufedon, kaj trovas miajn legad-okulvitrojn, kiujn mi jam serĉis la tutan matenon.

Mi decidas, ke mi devus remeti ilin sur la skribotablon, sed unue mi donos akvon al la floroj. Mi metas la okulvitrojn denove sur la bufedon, plenigas kruĉon de akvo, kaj subite mi ekvidas la telegvidilon.

Iu lasis ĝin sur la kuireja tablo. Mi konstatas, ke ĉi vespere kiam ni volos rigardi televidon, mi devos serĉi ĉi tiun telegvidilon, sed mi ne memoros, ke ĝi troviĝas sur la kuireja tablo, kaj pro tio mi decidas meti ĝin en la salonon kie ĝi devas esti, sed unue mi donos akvon al la floroj.





Mi ŝprucigas iom da akvo sur la florojn, sed la plejparto disverŝas sur la plankon.

Do, mi metas la telegvidilon denove sur la tablon, akiras kelkajn tukojn kaj forviŝas la renversiĝaĵon.

Tiam mi ekiras laŭ la koridoro penante memori kion mi planis fari.

Je tagfino: la aŭto ne estas lavita, la fakturoj ne estas pagitaj, estas varma ladskatolo da kolaĵo sur la bufedo, la floroj restas sekaj, ankoraŭ troviĝas nur unu ĉeko en la ĉeklibreto, mi ne povas trovi la telegvidilon, mi ne povas trovi miajn okulvitrojn, kaj mi ne povas memori kion mi faris pri la aŭtomobila ŝlosilo.



Kaj kiam mi provas rezoni kial hodiaŭ mi faris nenion, mi vere konfuziĝas ĉar mi scias, ke mi estis okupita la tutan tagon, kaj mi estas tre laca. Mi konscias, ke ĉi tio estas grava problemo, kaj mi provos akiri helpon, sed unue mi kontrolos la retroŝton.

Ĉu vi bonkore faru komplezon por mi? Sendu ĉi tiun mesaĝon al via tuta konatularo, ĉar mi ne memoras al kiuj oni jam sendis ĝin.

Ne ridu - se vi ne rekonas vin mem, via tempo venos!

**PLIAĜIĜO ESTAS DEVIGA. MATURECO ESTAS LAŬ ELEKTO.**

— trovita en la retroŝtaĵo

## SONĜOJ

Mi sonĝis ke la teron mi forlasis,  
Kaj fluge iris al la blua Sfero..  
Kiel belega estas la Etero,  
Al mondo de koloroj mi trapasis.

Ĉe la majesta paradiza pordo,  
Ripete mi frapadis - emoci'!...  
Kaj Sankta Petro venis tuj al mi,  
Petante ke mi kantu sen distordo.

Kaj kvazaŭ murmurante ardan preĝon,  
Mi tuj respondis Lin: "Jesuamanto,  
Sindona Petr', Amiko de la Reĝo,  
Ĉu ĉi tie komprenetas Esperanto?"

Ĉar nur en tiu lingvo mi kapablas  
Kantadi kaj forigi lingvobaron...  
Se vi permesas do, se vi afablas,  
Mi instruos la tutan anĝelaron!...

Pro mia ignoro kompatanta,  
Respondis li kun voĉo de mielo:  
"Por la teranoj, lingvo Esperanta,  
La lingvo parolata en Ĉielo!..."

Ho Dio!... Tre agrabla la surprizo.  
Surlite mi vekiĝis en momento,  
Kiam disblovis himnon dolĉa vento,  
Resonis ĝi tra l'tuta Paradizo!...

— Dokito, Muritaba, Brazilo